

# Tutlanda E-simpozio en Rumanio

Inter 5-7 oktobro 2012 la rumanaj esperantistoj kuniĝis en Răscruți (Cluj). Partoprenis la aranĝon ĉirkaŭ 40 personoj, inter kiuj gastoj de Hungario kaj Serbio.



*Surfote: Bonveniga folio en la teko*

La temo de la simpozio estis *Esperanto kaj edukado* kaj gvidis ĝin Aurora Bute.

La unua parto de la simpozio, *Edukado pri E-o*, enhavis prelegojn pri E-kursoj, projektoj, universalaj E-aranĝoj, historio de E-agado, (*La kurso e-125* – Stefan MacGill, *La mondo laŭ la vizioj de Zamenhof kaj Martinus* – Mihai Trifoi, *La E-movado en Transilvanio ĝis la unua mondmilito* - Marian Vochin, *La projekto Comenius* - Mariana Berariu, *Universalaj E-aranĝoj en 2012* - Aurora Bute) kaj en la dua parto, *Edukado per E-o*, oni prelegis E-e pri diversaj fakoj: komputado, medicino, religio, historio, geografio k.a. (*Komputilprograma ilaro por elektronikaj lingvokursoj* - Radojica Petroviĉ, *Sur la vojo de Sankta Jakobo* – Jozefo E. Nagy, *Kelkaj dokumentoj pri la instruado de apotekistoj, kadre de la Universitato en la urbo Cluj inter 1872-1919* - Ștefan Budahazy, *E-filmfestivalo en Pollando*– Emil Crâncău, *La Biblioteko de Aleksandrio* - Mihaela Dolca, *La Danuba delto* - Adriana Dolca k.a.).



*Surfote: Pleto kun jubilea simbolo*


Mihai Trifoi gvidis la *Konversacian Rondon*, sabate kaj dimanĉe, pri manĝoj, pladoj kaj oni argumentis por kaj kontraŭ la vegetaranismo.



*Surfote: Konversacia rondo*

Interesa estis la *Debato*, okazinta sabaton, pri la temo *Ĉu E estas facila lingvo?* Gvidis la argumentadon Radojica Petroviĉ, la du “batalantoj” estis Stefan MacGill kaj Jozefo E. Nagy. En la fino, la ambaŭ flankoj konsentis, ke *ĝis unu grado E esta simpla, post tiu grado, E estas malfacila*.

Dum la ekskursita tago ni vizitis la Kastelon Bánffy de Bonțida, la urbon Gherla (la armenan preĝejon) kaj la Monahejon Nicula. Dum la vizito de la armena preĝejo, alvenis la ambasadoro de Francio, kiu volis vidi la gravan pentraĵon de Rubens. Li aŭskultis la esperantan tradukon (far Jozefo Nagy) kaj interesiĝis pri la lingvo.



*Surfote: Stefan MacGill prelegas*



*Surfote: Radojica Petroviĉ prelegas*

La **Kastelo Bánffy** estas arkitektura komplekso konstruita de la familio Bánffy en la komunumo Bonțida (Boncida), en la distrikto Cluj (Kluĵ). La nukleo de la komplekso da konstruaĵoj estas renesanca, la postaj aldoniĝoj estis faritaj dum la XVIII-a jarcento en baroka stilo, kaj dum la XIX-a jarcento en romantika stilo (inkluzive la novgotika galerio en la jaro 1890). Nun la ensemblo estas en restaŭra procezo.

En la jaro 1944 la germana armeo evakuis la proprietulojn, por uzi la kastelon kiel militan hospitalon. La konstruaĵo estis serioze damaĝita fine de la dua mondmilito, kiam la retiriĝintaj germanaj trupoj atakis, rabis kaj bruligis la tutan ensemblon. Estis detruitaj la tuta meblaro, pinakoteko, la konata portretgalerio kaj la biblioteko.



*Surfote: Komuna foto*

En la komunista erao, parto de la kastelo fariĝis sidejo de agrikultura kooperativo. Manko de renovigoj dum jardekoj grave damaĝis la konstruaĵon. La vilaĝanoj uzis la brikojn de la kastelo por konstrui siajn domojn, la parko fariĝis paŝtejo kaj la arboj – brulligno.

Post la forfalo de komunismo, en la jaro 1999, komenciĝis la renovigo de la kastelo. Grava ĉiele estis la oficiala kunlaboro inter la Ministerio pri Kulturo (Rumanio), la Instituto pri Konservado de Historiaj Konstruaĵoj (Britio) kaj la Oficejo por la Protektado de la Kultura Heredaĵo (Hungario).

La princo Charles de Wales prenis sur sin la patronecon de la renovigado, li vizitis plurfoje la lokon. La renovigado ricevis la premion “Eŭropa nostra” far EU.

**La urbo Gherla** (en la nordokcidenta parto de Rumanio) estas la sola rumana urbo konstruita (fine de la XVIII-a jarcento) laŭ difinita plano. La dominanta stilo estas la baroka, pro la fakto, ke la urbo estas fondita de la armeniaj kolonistoj, kiuj enkondukis la barokan stilon en Transilvanion. Ili alvenis el Moldavio laŭ iniciato kaj kun la akcepto de la Imperiestra Kortumo de Vieno.



*Surfote: Dancado*

Ni vizitis la **Armeni-Katolikan Katedralon**, kies konstruado finiĝis en la jaro 1804. Tiam la maljunuloj de la urbo decidis serĉi belan pentraĵon por la altaro. La tiamaj armenoj estis riĉaj kaj ili ofte pruntedonis monon al la aŭstra imperiestro. Kiel danko, Francisko la Unua invitis ilin elekti pentraĵon el la imperiaj galerioj de Vieno. La armenoj elektis *La malsuprenirigo de Jesuo de super la Kruco* de Peter Paul Rubens, grandega pentraĵo, tamen tro malgranda por la altaro. Kvankam la pentraĵo valoras milionojn da dolaroj, oni povas vidi ĝin senpage en aparta kapelo konstruita speciale por ĝi.



*Surfote: Ekskurso al la kastelo*

Unu el lamplej interesaj ĉapitroj de la rumana popola arto estas la pentrado sur vitro, kiun oni praktikis ekskluzive en Transilvanio.

La plej malnova centro de survitra pentrado estas la vilaĝo **Nicula**, kie preskaŭ ĉiu domo estis pentrejo. La plej oftaj temoj estas *La Naskiĝo*, *La Bapto*, *La lasta manĝo* kaj ikonoj pri diversaj sanktuloj.

En la malnova ligna preĝejo estas la miraklofaranta ikono de la Sanka Maria, pro kiu la monaĥejo estas fama. Ni vidis tie en la muzeo malnovajn laboraĵojn, ikonoj kaj libroj, inter ili la unua libro en la rumana lingvo.

La aranĝo estis bela plektiĝo de laboro kun ekskursoj kaj distro (interkona vespero, tombolo kaj danco). Okazis ankaŭ estarkunveno de la landa asocio kaj ILEI-sekcio, dum triona estraro de ILEI (Stefan MacGill, Radojica Petroviĉ kaj Enikó Sereghy) kunvenis aparte.

La simpozia dokumentaro estis verda interesa teko, enhavanta krom la ĝeneralan kaj la simpozian programojn, ankaŭ bonvenigan karton, detalan priskribon de la vizititaj objektivoj kaj belan donacon – lignan pleton, kun la simbolo de la 125-a jubileo de Esperanto.

Fakte la tuta aranĝo estis deducita al la ĉijara jubileo. Krome, la simpozio okazis la 5-an de oktobro, do ĝuste dum la Monda Tago de la Instruistoj, pro tio ni adoptis rezolucion, jam disvastigita de Stefan MacGill en Esperantujon.

Tradicie, EAR invitas ĉiujn E-asociojn de Rumanio partopreni sian aranĝon, kaj venis reprezentantoj de la E-Asocioj de Oradea kaj Cluj kaj de la fervojistoj.

La etoso estis bela, vere esperantista, ĉio iris glate dank' al la modela laboro de la lokaj organizantoj, Mariana Berariu kaj Adrian Mărginean, al kiuj iras niaj dankoj kaj gratuloj!

*Aurora BUTE*



*La malsuprenirigo de Jesuo de super la Kruco* de Peter Paul Rubens